

# Buraj militoj

Oldřich Arnošt Fischer

Prelego por Esperantista Klubo Brno, filia societo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,  
la 15-an de januaro 2020

Buraj militoj (1880-1881, 1899-1902) estis konfliktoj inter Grandbritio kaj du buraj ŝtatoj, Respubliko Transvalo kaj Oranĝa Liberŝtato. en suda Afriko.

## Portugaloj en suda Afriko

En la jaro 1488 portugalo Bartolomeo Dias (1450-1500) serĉante vojon en Hindion unuafoje akiris la plej sudan parton de Afriko. La dua estis Vasco da Gama (1496-1524), kiu la 24-an de novembro 1497 preteriris Kabon de Bona Espero. Sed la portugaloj tie konstruis neniun havenon, ĉar ili havis multe da konfliktoj kun indiĝenoj.

## Nederlandanoj, aliaj nacioj kaj buroj

En la jaro 1602 estis fondita Unuiĝita Nederlanda Orient-Hinda Kompanio (*Vereenigde Nederlandsche Oost-Indische Compagnie*). En la jaro 1652 Nederlandanoj fondis Kaburbon.

Tien nederlandaj malliberuloj, eksaj krimuloj, estis deportitaj. Post fino de iliaj punoj ili tie povis vivi kiel liberaj homoj. Francaj nekatolikoj elmigris en la jaro 1685, ĉar Ludoviko la 14-a ne estis al ili tolerema.

Eŭropanoj en Afriko disvastigis variolon, kiu kaŭzis morton de multe da homoj, precipe indiĝenoj. En suda Afriko ne estis sufiĉe da virinoj, tial eŭropanoj miksiĝis kun indiĝenoj. Nederlandanoj, germanoj, francoj, skandinavo, kiuj miksiĝis kun indiĝenoj, serĉis fruktodonan teron kaj paŝtejojn. Dum centoj da jaroj ili kreis novan nacion, kiun nomiĝis buroj (kampanoj). Buroj parolis afrikansan. La afrikansa lingvo estis bazita de nederlanda lingvo, sed dum multe da jaroj ĝi evoluis izolite de nederlanda lingvo prenante vortojn el aliaj lingvoj, eĉ afrikaj lingvoj de kojsanoj, zuluoj, bantuoj k. a. La afrikansa havas pli simplan kaj pli fonetikan gramatikon ol nederlanda lingvo. La unua afrikansa libro estis eldonita en la jaro 1861. Ekde la jaro 1925 afrikansa lingvo estas oficiala ŝtata lingvo de nuntempa Sudafrika Respubliko, same kiel angla lingvo.

## Kalvinismo kaj rasismo, sklavo

Buroj estis plimulte kalvinanoj. Tio estis nekatolikoj, plimulte laboremaj kaj ŝparemaj homoj, kiuj volis vivi laŭ kristanaj idealoj. Franca reformisto Jean Kalvin (1509-1564) instruis, ke homoj havas siajn sortojn. Ili aŭ per Dio estas elektitaj aŭ ne. Buroj neniam dubis, ke ili estas la elektita nacio, tial ili malbone konduktis al indiĝenoj (tiel nomataj „kafroj“), kiujn sklavigis. En sudan Afrikon estis transportitaj sklavo el Batavio, Cejlono kaj aliaj landoj. Bura rasismo estis unu el kialoj de ilia malvenko.

**Paradokse en la mondo la nacioj, kiuj kapablas brave batali por sia propra libereco, iam ne volas respekti liberecojn de aliaj nacioj.** Buroj vivis en senĉesaj konfliktoj kun indiĝenoj, kies landon ili ŝtelis.

## Edukado kaj pensmaniero de buroj

Buroj estis ofte piaj, bravaj, fieraj, laboremaj kaj ŝparemaj homoj, bonegaj ĉasistoj kaj pafistoj. Afriko estis ilia patrujo. Ili ne estis tre edukitaj. Ili farmoj situadis malproksime unu de la alia, tial buraj infanoj ne vizitadis lernejojn. Ili estis instruantaj hejme. Adoltaj buroj sciis legi, skribi kaj kalkuli, sed la Sankta Biblio ofte estis nur unusola libro, kiun ili dum sia

tuta vivo tralegis. Buroj diradis, ke ili ne sentas sin esti liberaj, se ili vidas fumon de najbaroj. Malfacila vivo gvidis al individualismo, izolado al konzervatismo.

### **Britoj en Kaburbo**

En la jaro 1795 franca armeo subgvide de Napoleono okupis Unuiĝitajn Nederlandajn Provincojn. Britoj timis, ke ankaŭ Kaburbo, strategia punkto, estos baldaŭ okupita, tial ili mem ĝin okupis. En la jaro 1803 britoj Kaburbon forlasis, sed en la jaro 1806 ili revenis. Kiam Napoleono estis venkita, dum Viena Kongreso (1814-1815) nederlandaj kolonioj Kaburbo kaj Cejlono ekapartenis al britoj. En suda Afriko rilatoj inter britoj kaj buroj komence ne estis malamikaj. Britoj eĉ helpis al buroj tiel, ke ili alportis en sudan Afrikon skotlandajn pastorojn. Sed en la 20-aj jaroj de la 19-a jarcento britoj volis krei en Kapurbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo veran britan kolonion kun angla lingvo, brita mono kaj brita ŝtata administraro.

### **Granda Elmigrado**

Ekde la jaro 1807 en tuta Britia imperio estis malpermesita komerco kun sklavo. Ekde la jaro 1828 ĉiuj liberaj afrikanoj ekhavis egalajn rajtojn kiel blankuloj. En la jaroj 1833 nigraj sklavoj estis egalrajtitaj. Buroj, kiuj estis influataj per kalvinismo, kapablis nek ekkompreni nek akcepti, ke „kafroj“ havas egalajn rajtojn kiel ili. Krom tio buroj ne estis riĉaj kaj uzadis senpagan laboron de siaj sklavoj. Tial ili estis ekonomie endanĝeritaj. Jam en la jaro 1834 buraj familioj ekeliris nordorienten, malantaŭ la rivero Vaal. Ĝis fino de la jaro 1835 ĉirkaŭ 14 miloj da buroj foriris.

### **Respubliko Natalo**

La Granda Elmigrado ne estis facila. Indiĝenaj zuluoj kontraŭ buroj batalis. La 16-an de decembro 1838 en batalo apud Sanga Rivero bura militestro Andries Pretorius (1798-1853) zuluojn venkis. Apud la urboj Pietermaritzburg kaj Port Natal (nuntempa porto Durban) estis fondita bura Respubliko Natalo. Sed en la jaro 1843 britoj la Natalon okupis.

### **Respubliko Transvalo kaj Oranĝa Liberŝtato**

Parto de buroj trovis novan hejmon inter la riveroj Oranĝo kaj Vaal. Sed en la jaro 1848 britoj tiun teritorion okupis. Buroj, kiujn gvidis Andries Pretorius (1798-1853), estis venkitaj en batalo apud Boomplaats (la 29-an de aŭgusto 1848). Nur la plej aĝa filo de Pretorius, bura politikisto Marthinus Wessel Pretorius (1819-1901) akiris sukceson. Li al britoj promesis liberan komercon kaj malpermeson de sklaveco. La 17-an de januaro 1852 Grandbritio akceptis Respublikon Transvalon (Sandrivera Konvenco).

La 23-an de februaro 1854 Grandbritio akceptis Oranĝan Liberŝtaton (Bloemfonteina Konvenco).

### **Civitana milito inter Respubliko Transvalo kaj Oranĝa Liberŝtato**

Malamikoj de buraj respublikoj ne estis nur britoj. Rilatoj de ambaŭ buraj respublikoj ne estis amikaj. Pretorius volis krei unu buran ŝtaton, tial en la jaroj 1860-1864 okazis civitana milito inter ambaŭ buraj respublikoj. Pretorius ne sukcesis kaj fariĝis prezidento de Transvalo. Kaŭze de civitana milito ambaŭ buraj ŝtatoj ekonomie stagnis.

### **La unua bura milito**

Lando de buroj ne estis malriĉa. Krome oro kaj diamantoj tie troviĝis fosfatoj, kromio (Cr), berilio (Be), antimono (Sb), mangano (Mn), karbo, fera erco (Fe), kupro (Cu), urano (U), kaj stano (Sn). Klimato estis bona por plantado de citrusaj fruktarboj kaj ternuksoj (araĥidoj, *Arachis hypogaea* el la familio Fabaceae).

En la jaro 1867 apud urbo Kimberley estis malkovritaj diamantoj. Multe da britoj volis la diamantojn mini. En la jaro 1877 britoj aneksis Transvalon. En la jaro 1880 buroj ekribelis kaj tio estis komenco de **la unua bura milito**. En batalo apud Majuba (la 27-an de februaro 1881) bura generalo Nicolaas Smit (1837-1896) britojn venkis. Ili devis akcepti sendependecon de Transvalo (Pretoria Konvenco).

En la jaro 1883 bura politikisto Paul Kruger (iam oni skribas Krüger) fariĝis prezidento de Transvalo. Paul Kruger (1825-1904) devenis el Pruslando. Li estis tre pia kalvinano, kiu ĉie portis Biblion kaj ŝatis ofte ĝin citi. En sia junaĝo li travivis Grandan Elmigradon de buroj malantaŭ la rivero Vaal, tial li malamamis britojn.

### **La dua bura milito**

En la jaro 1886 oni malkovris oron en Witwatersrand. Buroj timis, ke baldaŭ en buraj respublikoj estos pli multe da britoj ol buroj, tial ili en la jaro 1890 eldonis la leĝon, laŭ kiu enmigrintoj povis baloti nur post 14 jaroj de vivo en buraj respublikoj. Tio al britoj ne plaĉis. En la jaro 1895 brita ministro de kolonioj fariĝis Joseph Chamberlain (1836-1914), tiam britoj ekplanis anekson de Transvalo. Atako kontraŭ Transvalo (1895-1896) ne estis sukcesa. Dum konferenco en Bloemfontein (31.V.-5.VI.1899) traktis Paul Kruger kun brita komisario por suda Afriko Alfred Milner (1854-1925), sed la traktado ne estis sukcesa. Buroj donis al britoj ultimaton (la 9-an de oktobro 1899) kaj post du tagoj, la 12-an de oktobro 1899 atakis Natalon. Tiel la 12-an de oktobro 1899 **la dua bura milito** komenciĝis.

Komenco de la milito estis por buroj sukcesa. Ili por longa tempo sieĝis tri britajn urbojn: Mafeking (14.X.1899-17.V.1900), Kimberley (15.X.1899-15.II.1900) kaj Ladysmith (2.XI.1899-28.II.1900). Paul Kruger opiniis, ke britoj baldaŭ ekscios, ke tiun militon, same kiel la unuan buran militon (1880-1881), ne venkos, tial li volis batali kontraŭ britoj ĝis fina venko de buroj. Sed britoj ne volis esti venkitaj. Britaj militŝipoj alportis novajn kaj novajn soldatojn kaj militmaterialon. Samtempe britoj blokis kontaktojn de buroj kun Eŭropo.

### **Koos de la Rey, granda bura personeco**

Inter buraj generaloj estis unu viro, kiu estis realisto. Jacobus Herculaas „Koos“ de la Rey (1847-1914) sentis, ke britoj estas potencaj. Tial li origine ne volis batali. Kruger pri li publike diris, ke Koos estas malkuraĝulo. Sed Koos al Kruger respondis: „Se ni devos batali, mi batalos ankoraŭ longtempe post via kapitulaco.“ Koos estis altstatura, tre pia, prudenta viro, patro de dek infanoj, kiu parolis nur malmulte kaj malrapide. Li longtempe pri ĉio pensis. Sed en bataloj li kondutis kiel energia komandanto, kiu ne timis. (Interese, ke antaŭ buraj militoj li neniam servis en armeo, ne estis trejnita kiel soldato.) Kiam aliaj lin admonis, por ke li estu pli atentema, li diradis: „Mi nur Dion timas, neniun alian.“ Koos kondutis humane al militkaptitoj.

### **Britaj soldatoj**

Britaj soldatoj en buraj militoj ne batalis en siaj tradiciaj uniformoj kun ruĝaj jakoj, sed ili portis kakiajn uniformojn. Ili estis varbitaj en Grandbritio, tial ili ne estis adaptitaj al klimato de suda Afriko. Buroj ilin moke nomigis „*rooinek*“ („ruĝaj nukoj“). Armea drilo ne povis anstataŭi la agopreton, kiun havis buroj.

Kuracistoj, kiuj servis en buraj militoj, jam uzadis sterilizadon de instrumentoj kaj anestezion. Problemoj okazis, se vunditaj soldatoj perdis multe da sango, ĉar oni ekuzadis sangajn transfuziojn nur en la 1-a mondmilito (1914-1918).

## **Buraj soldatoj**

Batalantaj buroj ne portis uniformojn. Ili uzadis precipe germanajn pafilojn de la distemo Mauser portante ŝarĝojn en siaj poŝoj. Buraj oficiroj estis elektitaj kaj ne portis epoletojn. Ili havis problemojn kun disciplino de soldatoj. Oni diradis, ke ĉiu buro estas generalo, sed ĉiu bura generalo havas la saman signifon kiel iu ajn buro. Buroj batalis en malgrandaj taĉmentoj. En la dua bura milito ili baldaŭ adaptis al gerila milito.

## **Koncentrejoj**

Britoj atakis precipe moralon de buroj. Ili al kelkaj buroj promesis, ke se buroj ne plu batalos kontraŭ britoj, ili povos vivi trankvile. Buroj, kiuj havis familiojn ofte preferis trankvilan kunvivon kun britoj. Krom tio britoj neniigis burajn farmojn. Ili bruligis 30 milojn da buraj farmoj. Virinoj kaj infanoj de buroj estis malliberigitaj en koncentrejoj. Britoj ne volis nebatalantajn burojn mortigi, sed malbonaj vivkondiĉoj en la koncentrejoj estis mortigantaj. Buroj suferis de malsato, manko de akvo kaj precipe epidemioj. En la koncentrejoj por blankuloj mortis 28 miloj da homoj, en la koncentrejoj por nigruloj mortis 14 miloj da homoj.

## **Superforto de britoj**

Grandbritio uzis 450 miloj da soldatoj, buroj havis nur 87 miloj da viroj. Du mil da volontuloj el Nederlando, Germanio, Francio kaj Ruslando ne havis signifon por rezulto de la milito. Britoj uzis kontraŭ buroj grandegan materialan superforton kaj ne ŝparis vivojn de siaj soldatoj. Kontraŭ buraj gerilanoj estis uzataj malgrandaj fortikaĵoj kun gardistoj, pikdraton kaj primitivaj mitraloj.

La 24-an de majo 1900 britoj anektis Oranĝan Liberŝtaton. La 1-an de septembro 1900 britoj denove anektis Transvalon. Kiam ili konkeris Komati Poort (la 25-an de septembro 1900), buroj estis izolitaj. Ili perdis kontakton kun la mondo.

La 19-an de oktobro 1900 Paul Kruger foriris en Eŭropon, kie li petis helpon por batalantaj buroj, sed nesukcese. En Eŭropo ekestis forta kontraŭbura koalicio kaj estis klara, ke neniu eŭropa lando al buroj efike helpos. Kruger mortis en Svisio (1904).

La 31-an de majo 1902 buroj en Vereeniging kapitulis.

## **Niaj samnacionoj en bura armeo**

En bura armeo batalis posteuloj de nekatolikaj elmigrintoj. La plej konataj estis **Pavel von Dornik-Plotner** (?-?) kaj **Jiří Viktor Figulus** (1858-1927), kiu estis lasta vivanta posteulo de Jan Ámos Komenský (1592-1670).

## **Aliaj interesaj personecoj**

**Winston Churchill** (1874-1965) laboris kiel korespondanto de brita ĵurnalo Morning Post. Buroj lin malliberigis, sed Churchill fuĝis.

**Arthur Conan Doyle** (1859-1930) estis brita kuracisto en la jaro 1900.

**Maháthma Gándhí** (1869-1948) estis unu el hindoj el Natalo, kiuj ne batalis, sed helpis transporti vunditajn soldatojn en malsanulejojn.

**Emil Holub** (1847-1902) laboris en Port Elizabeth kaj Dutoitspan (nuntempa antaŭurbo Beaconsfield en Kimberley). En marto 1973 li ekvojaĝis en Transvaalon, de kie li alportis 20 kestojn de valora natuscienca kaj etnografa materialo. Li ĝin donacis al Muzeo Náprstek en Prago. Ankaŭ la dua vojaĝo de Holub (1883-1887) kondukis tra Transvalo.

**Shirley Temple Black** (1928-2014), fama usona aktorino, dum erao de Václav Havel (1936-2011) ambasadorino en Ĉeĥoslovakio kaj Ĉeĥa Respubliko, kiel infano ŝi ludis en filmo britan knabinon, kies patro defendis la urbon Mafeking.

En la jaro 1941 germana nazio **Joseph Goebbels** (1897-1945) uzis temon de bura milito por kreado de kontraŭbrita spirito en Germanio. Germana filmo *Ohm Krüger* (Onklo Kruger) montras kruelecon de britoj, kiuj konstruis koncentrejojn por buraj virinoj kaj infanoj. Sed en la sama tempo germanaj nazioj uzadis pli krudajn koncentrejojn por murdado de homoj.

Britino **Emily Hobhouse** (1860-1926) trarigardis koncentrejojn por buroj. Ŝi alarmis publikon kaj plibonigis kondiĉojn en la koncentrejoj. Bedaŭrinde kaŭze de malbona higieno kaj infektaj malsanoj en la koncentrejoj mortis 28 miloj da buroj, precipe infanoj. Sinjorino Hobhouse vizitis nur la koncentrejojn por blankuloj. En la koncentrejoj por nigruloj vivis 24 500 homoj, el kiuj 14 000 homoj mortis.

### Ĉeĥlingvaj ĵurnaloj, verkistoj

En ĉeĥaj ĵurnaloj *Národní listy*, *Právo lidu*, *Národní politika*, *Dačické listy*, *Selské listy*, *Kolínské listy*, *Katolické listy* kaj *Kurýr* oni ofte publikis artikolojn „pri sudafrika milito“. Konsilanto de redaktoroj fariĝis Emil Holub, kiu bone sciis kondiĉojn en suda Afriko.

Pri buraj militoj verkis ne tre konataj ĉeĥaj verkistoj **Alfons Bohumil Šťastný** (1866-1922), **Alois Zucker** (1842-1906) kaj **Stanislav Ciliják** (1859-1939).

### Sudafrika Unio

En la jaro 1910 Kaburbo, Natalo, Transvalo kaj Oranĝo estis unuigitaj. La unua ĉefministro de Sudafrika Unio (brita dominio) fariĝis eksa bura generalo **Louis Botha** (1862-1919).

### Lasta bura kontraŭbrita ribelio, morto de Koos de la Rey

Bura generalo **Koos de la Rey** neniam akceptis malvenkon. En la jaro 1914, kiam la unua mondmilito komenciĝis (1914), buroj kontraŭ britoj denove ekribelis. Koos de la Rey veturis en Johannesburgon, sed survoje li estis pafmortigita. La ribelion venkis ne britaj, sed eksaj buraj generaloj.

### Apartismo

En la jaro 1917 unuafoje estis uzita malbela vorto „*apartheid*“ (apartismo) en parolado de politikisto **Jan Smuts** (1870-1950). En la jaroj 1948-1994 apartismo estis oficiala politiko de Sudafrika Unio kaj poste Sudafrika Respubliko.

### Sudafrika Respubliko

Ekde la jaro 1961 nomo de la ŝtato estas Sudafrika Respubliko.


### Rekomendita literaturo

BAUM, J. 1955: Holub a Mašukulumbové. Kapitoly o největším českém cestovateli. 1-a eld. Prago, Nakladatelství Československé akademie věd, 127 paĝoj.

FISCHER, O.A. 2018: Jiří Baum (1900-1944). Prelego por Esperantista Klubo Brno, la 4-an de aprilo 2018. – [www.literatura.bucek.name/brno//fischer\\_jiri-baum.pdf](http://www.literatura.bucek.name/brno//fischer_jiri-baum.pdf)


- FISCHER, O.A. 2019: František Alexander Elstner (1902-1974). Prelego por Esperantista Klubo Brno, la 6-an de novembro 2019. Prelego por Esperantista Klubo Brno, la 6-an de novembro 2019. – [www.literatura.bucek.name/brno//fischer\\_Frantisek-Alexander-Elstner\\_191110.pdf](http://www.literatura.bucek.name/brno//fischer_Frantisek-Alexander-Elstner_191110.pdf)
- HORA-HOŘEJŠ, P. 1996: Toulky českou minulostí, 5-a volumo, 1-a eld., Prago, Baronet & Via Facti, 230 paĝoj.
- KADLECOVÁ, M. 2012: Búrské války a jejich ohlas v české společnosti. Bakalaŭra laboro. Prago, Karola Universitato, Pedagogia Fakultato, Katedro de Historio kaj Historia Didaktiko, 85 paĝoj.
- NEKOLA, M. 2018: Po stopách Čechů v Jižní Africe. Historický obzor. Časopis pro výuku dějepisu a popularizaci historie, 29: 102-110.
- NERAD, F. 2004: Búrská válka. 1-a eld. Prago, Orbis Bellorum, 232 paĝoj.
- PLUHAŘ, Z. 2009: Chemický slovník esperantsko-český a česko-esperantský/Ĥemia vortaro esperanta-ĉeĥa kaj ĉeĥa-esperanta. 1-a eld., Dobřichovice, Kava-Pech, 201 paĝoj.
- REID, R.M. 2011: Dějiny moderní Afriky od roku 1800 po současnost. 1-a eld. Prago, Grada Publishing, a.s., 336 paĝoj.
- ROBERTS, J.M. 2000 : Ilustrované dějiny světa VI. Vývoj evropské civilizace. 1-a eld. Prago, Euromedia Group, Knižní klub a Balios, 192 paĝoj.
- ROBERTS, J.M. 2000 : Ilustrované dějiny světa VIII. Mocné říše Evropy. 1-a eld. Prago, Euromedia Group, Knižní klub a Balios, 192 paĝoj.
- ŠIKOVÁ, K. 2015: Gerilová válka a britská odvetná opatření během búrské války 1899-1902. Bakalaŭra laboro. Pilzeno. Okcidentbohemia Universitato, Filozofia Fakultato, 54 paĝoj.
- TUČEK, J. 2015: F.A. Elstner, muž činu. 1-a eld. Prago, Grada Publishing, a.s., 142 paĝoj.

## Bildoj





Ternuksoj, araĥidoj (*Arachis hypogaea*), fruktoj, diamantoj, oro (Au), fosfatoj, kromo (Cr), berilo (Be), antimono (Sb), mangano (Mn), karbo, fero (Fe), kupro (Cu), urano (U), stano (Sn).



Bura ofenzivo en la jaro 1899

Sieĝitaj britaj urboj:

**MAFEKING**  
(14.X.1899-17.V.1900),  
ekde la jaro 2010: **MAHEKING**.

**KIMBERLEY**  
(15.X.1899-15.II.1900)

**LADYSMITH**  
(2.XI.1899-28.II.1900)

Situacio en la jaro 1900. Post anekso de Transvalo kaj Oranĝo lasta bura haveno Komati Poort estis konkerita. Tiel la 25-an de septembro 1900 buroj perdis kontakton kun la mondo. Buroj kapitulacis la 31-an de majo 1902 en Vereeniging.

